

SPECIALA GASTO EN AŬGUSTO

Kvankam la vivo en la ĉefurbo iom stagnis en somero, tamen fine de aŭgusto ni ĝuis la ĉeeston de gasto, kun kiu ni povis renkontiĝi en la sidejo por speciala prelego.

Esperantisto el Bahrejno Wael Almaĥdi, kiu turismis en Madrido dum unu semajno, kontaktis la Liceon, kaj la dimanĉon 20an tri madridanoj akompanis lin en ekskurso al La Granja de San Ildefonso kaj Segovio. Tra la ravaj ĝardenoj de La Granja gvidis nin lokano David, ĵus reveninta el la IJK, kaj krome promenante tra Segovio okazis karambola renkonto kun samideano el Cáceres, kiu dum la venonta lernoĵaro studos en Madrido.

La sekvan tagon Wael faris interesan prelegon en la sidejo de HEF-MEL pri la influo de la mezorientaj lingvoj sur Esperanton, ilustrante ĝin per belaj lumbildoj. La prelego estis filmita kaj espereble baldaŭ la filmeto publikiĝos.



MADRIDANOJ TRA LA MONDO

Pluraj madridanoj partoprenis internaciajn kongresojn kaj renkontiĝojn de Esperanto dum la somero.

Almenaŭ kvar ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto.

La postan semajnon, du madridanoj partoprenis la duoblan renkonton de junuloj (la 79-an Internacian Junularan Kongreson) kaj instruistoj (la 56-an Kongreson de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instrukistoj, ILEI), en Lignano Sabbiadoro, ankaŭ en Italio, inter la 5a kaj la 12a de aŭgusto. En la foto, Félix ĉe mozaiko pri Zamenhof en Udine.

AGNOSKO AL MADRIDANO

La lastan tagon de la Universala Kongreso oni anoncis la Diplomojn de UEA pri Elstara Agado kaj pri Elstara Arta Agado. Unu el ili venis al Madrido: nia amiko Miguel Fernández Martín ricevis ĝin “pro la plurjara konscienca prezidado de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj aliaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri poezio, tradukoj, muziko kaj komentarioj (...)”.

Ankaŭ ricevis tiun agnoskon alia amiko, la kantabro Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) “pro la plurjara sekretariado de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri verkado, eldonado, tradukoj, filmado kaj muziko. (...)”.

Gratulon al ambaŭ kaj al la ceteraj premiitoj pro la meritplena agnosko.



EN LA GAZETARO EN SOMERO

La Tago de Esperanto, la 26-an de Julio, kaj la Universala Kongreso en Torino estis la okazoj por aperigo de artikoloj pri Esperanto en diversaj amaskomunikiloj.

Dum la Tago de Esperanto estis legeblaj kelkaj mencioj en ĵurnaloj, sed la plej interesa estis la apero en la ŝtata televido, TVE-1, en la programo “Ahora o nunca”. La ĵurnalisto Arancha Bello vizitis la sidejon de HEF kaj filmis raporton, kun la partopreno de Ricardo Biurrun, Pedro Hernández kaj Alejandro Pareja, kiuj estis filmitaj interparolante en la lingvo, kaj Roberto Garvía, kiu klarigis la nunan staton kiel spertulo. Vi povas vidi parton en: https://twitter.com/La1_tve/status/1684185297481875456

La eĥo de la Universala Kongreso estis tre ampleksa en Italio, kie aperis longaj raportoj en diversaj ĵurnaloj, sed ankaŭ aperis informoj en Hispanio. La plej longaj estis tiu de la madrida ĵurnalo ABC kaj de la agentejo de Vatikano (ambaŭ legeblaj rete).

NOVAJ LIBROJ

La laste aperinta poemaro de Miguel Fernández “Semo de matenruĝoj” akireblas jam en la esperanta *originala versio*, same kiel ankaŭ en la lingvoj hispana (2a eldono) kaj portugala. Vi povas mendi ĝin pere de la UEA-Katalogo: <https://katalogo.uea.org/?inf=6228>.

En septembro aperos traduko en la hispanan de “Las abejas y lo invisible”, de la aŭstra verkisto Clemens J. Setz. Temas pri antologio de planlingvoj el literatura perspektivo: triono pri Esperanto kaj unu tuta ĉapitro pri la poezio de Jorge Camacho, kun poemoj paralele en Esperanto kaj la hispana. La libro jam mendebblas en la retejo de la eldonejo H&O Editores.

KONGRESO HISPANA

Jam 130 homoj aliĝis al la Hispana Esperanto-Kongreso, okazonta inter la 12a kaj 15a de oktobro, en Sevilo. Iom post iom kreskas la informoj ĉe <https://kongreso.esperanto.es/>, ankaŭ kun provizora programo. Inter la prelegantoj, ni povas konfirmi la ĉeeston de Duncan Charters, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Krome, malfermiĝis kanalo por kongresontoj kaj interesatoj en la socia mesaĝilo Telegram. Petu adreson al la organizantoj.

SABATA RENKONTIĜO

Memoru ke ni renkontiĝas en la strato Esperanto la unuan sabaton de la monato. Malgraŭ la varmo okazis renkonto unuasabata en julio kaj eĉ en aŭgusto.

En septembro tio okazos la 2-an, en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

PLIAJ INFORMOJ KAJ RENKONTOJ

En septembro ni revenas al la kutimo koncerne la renkontiĝojn en la sidejo. Dum ĉiuj lundoj ekde la 18,30 horo, ni proponas komunajn paroladojn, legadojn kaj deklamadojn.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*, nun *X*), vi povas trovi nin ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida>.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

Redaktas Toño del Barrio

madrid@esperanto.es

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

